



aktuala

35-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belĝujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Eltiro 200 ekzempleroj.

In formoj : <http://users.belgacom.net/EBG> ; ebg.skynetblogs.be ; xurb.leadhoster.com ; esperanto.net ; lernu.net ; uea.org ; liberfolio.org ; eo.eventeo.net ; sites.google.com/site/ebgaktuala ; sites.google.com/site/panb2001

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Kotiz-tabelo 2011
- Paĝo 3 - Reĝoj en Brazilo laŭ Márcio Nascimento el Rio de Janeiro
- Paĝo 6 - Esperantista Teroristo kondamnita en Rusujo
- Paĝo 10 - Agado de Esperantista Brusela Grupo tra fotoj
- Paĝo 11 - Jacob Hasbun tradukis Eseon de Jorge Luis Borges
- Paĝo 12 - Poemaro de Garcia Orive kaj Olavo Bilac
- Paĝo 13 - Jakvo Schram pri Flurk, la ĝentila gardhundo
- Paĝo 15 - Julio Mangada Rosenörn, Elstara Esperantisto

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Novembro 2010

- 03 Eric Baert pri liaj spertoj loĝante en Irako
- 10 Ĝenerala Jarkunsido de Esperantista Brusela Grupo
- 17 Michèle Viliers kaj Hubert de Meyere el Bouffouls pri Historio de Belĝujo
- 24 Barbara Poterucha pri diversaj aspektoj de nia sano

Decembro 2010

- 01 Semajna kunveno
- 08 Angelos Tsirimokos pri Kalendaro
- 15 Grupanoj laŭvole kunportu trinkaĵetojn, manĝetojn, ŝercetojn, pro Zamenhofa Tago
- 22 kaj 29 Grupo ne kunvenas pro kristnaskaj kaj novjaraj ferioj

Januaro 2011

- 05 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 12 Semajna kunveno
- 19 Semajna kunveno
- 26 Bernard-Regis Larue (kaj poste ankaŭ la 6an de Aprilo) pri Astronomio, laŭ sekvantaj temoj:
Vivo kaj morto de steloj, Messier-objektoj, beleco kaj strukturo de fora universo, lastaj novaĵoj pri esplorado de Suna sistemo.

KOTIZ-TABELO 2011

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo (25 X MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	25	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	61	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	122	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1525	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)

Kara membro de EBG, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2011 al konto 000-0 123 048-52

ROLAND ROTSAERT

Ni bedaŭras lian maldaŭrigon kaj certigis lin ke li daŭre estos ĉiam bonvena en niaj kunvenoj. Jen lia mesaĝo de la 15a de Oktobro :
Hodiaŭ mi ricevis la novembran numeron de Aktuala Esperanto. Bedaŭrinde mi devas anonci vin ke mi ne daŭrigos mian membrecon en la jaro 2011. Dum la pasintaj jaroj, laborante en Bruselo, mi ege malofte povis ĉeesti la kunvenojn de la Brusela Grupo. Nun mi pensiigis kaj la ebleco estos kvazaŭ nula. Tamen, mi deziras ĉion bonan al la Brusela Grupo kaj gratulas la redaktoron pro la belaspekta, zorge farita kaj enhavriĉa bulteno.

Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge
www.rotsaert.com

ARKONES EN POLUJO

ARTaj KONfrontoj en ESperanto, ARKONES en Poznano, Polujo, okazis jam por la 26-a fojo de la 24-a ĝis la 26-a de septembro. En la muzika parto de la riĉa programo estis koncertoj de SoloTronik, Kapriol', Joachim Kolpanowicz, Johannes Mueller kaj de la duo Tomasz Sliwak kaj Milena Sliwak. Teatron reprezentis Adam Chrupczak, Jarlo Martelmonto kaj la kabareda grupo "La oraj pantalonej en arbustoj". En la kleriga programo estis Tomasz Chmielik, Roman Dobrzyński, István Ertl, Zbigniew Galor, Aleksander Korĵenkov, Katalin Kováts, Ulrich Lins, Barbara Pietrzak kaj pluraj aliaj.

Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

REĜOJ EN BRAZILO

Pri la ducentjariĝo de la alveno de la reĝa portugala familio al Rio de Janeiro, fuĝante la Napoleonajn trupojn.



Johano VI, regante dumvive de Maria I, lia patriĝo, ŝanĝis portugalan ĉefurbon al Rio de Janeiro, post invado 1807-1810 de tri armeoj de Napoleono Bonaparte kun famaj generaloj Soult, Junot kaj Massena. En la unuaj jaroj de la deknaŭa jarcento parto de Eŭropo estis sub la reĝo de Napoleono, imperiestro de Francujo. La nura baro kontraŭ la plifirmigo de lia imperio en Eŭropo estis Anglujo, kiu pro ĝia insula situacio, ekonomika povo kaj mara superego, ne estis konkerita. Por venki ĝin, Napoleono starigas la kontinentan blokadon, tio estas, ordonas la fermon de la havenoj de la eŭropaj landoj al la angla komerco. Li celis malfortigi la anglan ekonomikon,

3
kiu regis mondan varan komercon, kaj sukcesi aĉetantojn por la francaj varoj. La registaro de Portugalujo prokrastis akcepton de la ultimata ordono, pro sia alianco kun Anglujo, de kiu Portugalujo estis tre dependa. Sed portugaloj ne havis militan povon aŭ potencon por kontraŭi Francujon.



Johano VI kun edzino Karlota Joaquina, unua filino de hispana reĝo Karlo IV. La angloj sugestis ke la sidejo de la portugala imperio translokiĝu al Brazilo. Multaj membroj de la portugala monarkio ankaŭ opiniis tiel. Finfine la reganta princo Johano decidis fuĝi al Brazilo antaŭ la franca invado. Sed la subita enŝipiĝo de miloj da homoj kaj iliaj posedaĵoj estis tre konfuza. La tuta ŝtata burokrataro venis al la kolonio: ministroj, konsilistoj, juĝistoj, funkciistoj de la ŝtata kaso, oficiroj de Armeo, Mararmeo kaj membroj de la supera pastraro. Kestoj kun vestoj, valizoj, sakoj, ĉio sekvis alportitaj de la reĝa

4
kortego, kaj ankaŭ riĉaĵoj: artaj kaj muzeaj objektoj, la Biblioteko Reĝa kun pli ol 60.000 libroj, la tuta mono de la ŝtata kaso kaj juveloj estis metitaj en la holdojn, same kiel ĉevaloj, bovoj, bovinoj, porkoj, kokinoj kaj aliaj manĝaĵoj.



Johano VI reĝo de la kvara portugala dinastio nomata Bragança, havis kunsangan malsanan sindromon de la eŭropa dinastio Habsburga aŭ Aŭstria kies reĝaj familianoj kune geedziĝis dum multaj generacioj.

Dum la mateno de la 29^a de novembro 1807, la portugala ega ŝiparo finfine ekforiris el Lisbono. Atingis la havenon de Rio de Janeiro pli ol 3 monatoj poste, la 7^a de marto 1808. La vojaĝo ne estis facila, ĉar en la plenplenaj ŝipoj ne estis spaco por ĉiuj. Pluraj vojaĝis nur kun la vestitaĵoj en korpo, ĉar ne ĉio estis enŝipigita, pro tio ke la

spaco en la ŝipoj ne estis sufiĉa. Akvo kaj manĝaĵoj estis limigitaj kaj estis problemo eĉ higiena ĉar okazis pedika epidemio en la ŝipoj kaj la virinoj, ankaŭ tiuj de la reĝa familio, razis la harojn. La veno de la portugala kortego ŝanĝis la urbon Rio de Janeiro. Antaŭe malpura, malbela kaj malbonodora, ĝi plibonigis sian aspekton, kreskis, kaj iĝis laŭ eŭropa modo.



Johano VI kun unua filo kiu tra «*krio de rivero Ipiranga*» je 7-9-1822, iĝis Petro I unua imperiestro de apartigita Brazilo kaj samtempe Petro IV reĝo de Portugalujo.

En tiu epoko estis konstruigataj fontanoj por liveri akvon, pontoj, trotuaroj, oni malfermigis stratojn, vojojn, estis instaligita publika lumigo, okazis kontroligo de bazaroj, buĉejoj, oni organizis publikajn festojn. Tiuj plibonigoj okazis multfoje per monhelpo de riĉaj loĝantoj, kiuj siavice ricevis materiajn profitojn kaj nobelajn ordenojn de la reganta princo. Dum la periodo de la ĉeesto de Johano VI en Rio de Janeiro, la kvanto da loĝantoj duobliĝis en la ĉefurbo, de 50 mil al 100 mil. Alvenis eŭropanoj el diversaj landoj, kun diversaj celoj. Kelkaj celante komerci kaj aliaj celante laboradi. Estis hispanoj, francoj, angloj, germanoj, svisoj, belgoj, k.a. kun diversaj profesioj: kuracistoj, instruistoj, tajloroj,

kuiristoj, masonistoj, kvalifikitaj profesiistoj kaj funkciistoj, kaj diplomataj reprezentantoj, pro la fakto ke la urbo nun estis la sidejo de la portugala registaro.



Unu el la ŝipoj kiuj transportis Johanon VI al Brazilo kun 15 000 akompanantoj

Tamen la ĉeesto, samtempa de sklavoj kaj liberaj homoj en la urbo timigis la kortegon. Tio maltrankviligis la blankulojn kaj estis konstanta zorgo por la aŭtoritatoj. Multaj sklavoj fuĝintaj organizis komunumojn en la arbaroj proksimaj de la urbo kun centoj da homoj, kaj tio pligrandigis la socian malsekuran etoson. En la jaro 1810 estis subskribitaj Traktatoj de Amikeco, Komerco kaj Navigado. Tiuj traktatoj finigis la portugalan monopolon kaj trafis la interesojn de la portugala komercistoj, krom humiligi la portugalan regon. Anglujo postulis al si avantaĝojn kaj privilegiojn: la regadon de angla leĝo kaj anglaj juĝistoj kie loĝas anglaj civitanoj, la rajton konstrui tombejojn kaj preĝejojn protestantajjn, garantio ke Inkvizicio ne estu instalita en Brazilo, la alveno de anglaj varoj al Brazilo pagante nur 15% en la dogano, malpli ol la kotizo pagata

de la portugaloj mem, kiu estis 16%, kaj multe pli malalta ol tiu de la aliaj landoj, kiuj pagis 24% en la doganejo.



Alveno de Johano VI al Rio de Janeiro

Pri la sklaviĝo estis difinita grada abolicio de la vendado de sklavoj kaj ke la portugaloj nur kaptus sklavojn en la regionoj apartenantaj al Portugalujo.

La angloj klopodis eĉ altrudi daton por la finio de la vendado de sklavoj en la portugala regno, same kiel postulis kontrolon de la ŝipoj suspektaj komerci sklavojn. La princo, en la 28^a de januaro de 1808, dekretis la malfermon de la havenoj al la internacia komerco.

Tiu aranĝo, okazinta pro la neceso de la ĉeesto de la kortego en Rio de Janeiro, finigis la komercan monopolon, bazo de la rilatoj inter metropolo kaj kolonio, kaj estas konsiderata de la historiistoj kiel la vera sendependiĝo de Brazilo. Dum aprilo 1808 Johano VI malvalidigis la dekretojn, kiuj malpermesis novinstalon de produktaĵoj manufakturoj en la kolonio kaj liberigis de impostoj la importon de krudaĵoj por la

industrio, oferis subvencion por industrioj de lano, silko kaj fero, stimulant la uzadon de novaj maŝinoj. Samjare li kreis la Reĝan Bibliotekon, la unuan Bankon de Brazilo, lernejon de Mararmeo, la Reĝan Presejon, la grandan Reĝan Ĝardenon, kiu poste nomiĝis Botanika Ĝardeno por sciencaj provoj. En ĝi oni celis disvolvi iujn ajn komerceblajn kaj sanigajn vegetalojn. En ĝi estis klimatigitaj spicoj: cinamono, kariofilo, pipro, teaj folioj kaj fruktoj kiel ekzemple avokado kaj mango. Multaj el tiuj fruktoj venis el la Franca Gvajano.

Oni ankaŭ disvolvis la produktadon de nutraj plantoj, celante ankaŭ kreskigi la terkulturon por kontentigi la ĉefurbon. En la jaro 1809 oni kreis astronomian observatorion; samtempe estis reorganizitaj arsenaloj, oni fondis polvan fabrikan, kaj en 1811, estis instalita la Militista Akademio, institucio kiu celis ankaŭ instrui matematikon, kemion, historion, mineralogion kaj fizikon. Ĝi taŭgis por diplomiĝo de oficiroj de Armeo kaj de inĝenieroj, geografistoj kaj topografistoj, kiuj kapablis gvidi publikajn laborejojn kiel havenojn, vojojn, minojn, k.a. La alveno de la kortego taŭgis ĉefe al monprofitoj de la angloj kaj, krome, iĝis la genezo aŭ origino de la apartigo de Portugalujo kaj sendependiĝanta Brazilo.

Márcio Nascimento, Rio de Janeiro, Brazilo
Inko, prelego en KKE

"ESPERANTISTA TERORISTO" KONDAMNITA EN RUSUJO

Moskva kortumo trovis aktivulon de la sekto Portos, rilata kun Esperanto, kulpa pri starigo kaj gvidado de kontraŭleĝa armita grupo, kontraŭleĝa malliberigo kaj pri turmentado de diversaj homoj.

La prokuroro postulis ke Julija Privedjonaja estu kondamnita je kvar jaroj kaj duono en malliberejo, sed la kortumo kontentiĝis je dujara kondiĉa malliberigo. Kondiĉa malliberigo signifas, ke Julija Privedjonaja efektive restos libera, kondiĉe ke ŝi dum la puntempo ne kulpos pri novaj krimoj.

La organizaĵo Portos estis starigita en la vilaĝo Maŝkovo apud Moskvo en la jaro 1991 de Jurij Davidov, kiu ellaboris ĝeneralan "*teorion de feliĉo*". Por atingi plenan feliĉon la membroj de la sekto estis devigitaj verki poemojn, protokoli siajn misfarojn en kajeroj, kiujn oni nomis "*ekstera konscienco*", kaj studi Esperanton.

Almenaŭ pri la lasta tasko la sektanoj sukcesis malbone, atestas Moskvaj esperantistoj, kiuj dum la aktiva tempo de la sekto kelkfoje renkontis grupojn de la sektanoj en la lokaj Esperanto-kluboj. La "*feliĉuloj*", kiel esperantistoj eknomis la grupon, plej ofte konis nur kelkajn Esperantajn vortojn, kaj nur malmultoj kapablis efektive uzi la lingvon.

Tamen la rilato de la sekto al Esperanto estis intima. Ankaŭ neesperantistaj amaskomunikiloj

regule mencias tion, ekzemple Global Post, kiu ĵus raportis pri la temo.



Privedjonnaja manifestacias en Moskvo

La ekzistanta retejo de Portos daŭre havas kelkajn tekstojn en lama Esperanto kun stranga ortografio, supozeble kaŭzita de la fakto ke, en Sovetujo, por komposti tekstojn komputile, en Esperanto, oni uzis ofte specifajn tiparojn, en kiuj la literoj q, w, y kaj x estis anstataŭataj respektive de ĝ, ŝ, ŭ kaj ĉ. Jen unuaj punktoj de la programo de Portos:

**"Sub la sankta signo de l'Espero".
Ni bezonas Homecan Patrujon por
Feliĉa Popolo!**

Ni instruas ĉiujn ajn:

1. Altefekte labori kune kun ni dum 16 horoj tage: kontraŭpezuloj, babiluloj, vagabondoj, nenifaruloj, parazitaj kaj disruinigantoj de la Lando.

2. Atingi kaj antaŭeniri Usonon laŭ la nivelo de la laborprodukto, laŭ la nivelo ekonomika, milita kaj de intelektula potenco.

3. Zorge kaj efektive kunlabori kun la unuiĝo de veteranoj de milito kaj de laboro (la Prezidanto de la unuiĝo estis Heroo de Sovetunio, Vera Homo Alekseo Maresjev).

7
En la jaro 2000 la polico sturmis la ejon de Portos kaj arestis Jurij Davidov kaj kelkajn aliajn aktivulojn. En la ejo oni trovis junulojn el Ukrainujo, kiuj laŭ la rusiaj aŭtoritatoj estis enfermitaj tie kontraŭ sia volo, kaj regule punataj pro iliaj asertataj misfaroj. Krome estis trovita deko da ĉasistaj pafiloj kaj aliaj armiloj. Laŭ membroj de la organizaĵo la armiloj ne estis kontraŭleĝaj, kaj la junuloj libervole restadis en la ejo.

En la jaro 2002 du el la gvidantoj estis kondamnitaj je mallibereja puno. Du aliaj, inter tiuj la fondinto Jurij Davidov, estis senditaj al deviga flegado en mensmalsanulejo. Davidov forpasis en septembro 2009.

En la jaro 2004 pliaj du sektgvidantoj estis kondamnitaj, unu al du jaroj en malliberejo, alia al kondiĉa puno. Tio ne malhelpis aliajn aktivulojn de la grupo partopreni la Universalan Kongreson de Esperanto en Pekino, kie ili interalie fotiĝis kun Renato Corsetti kaj portis la flagon de Portos al la Granda Muro.

La flagon de Portos, kun verda stelo, uzis ankaŭ la homrajtaj aktivuloj, kiuj manifestaciis dum sama semajno en centra Moskvo, atendante la verdikton kontraŭ Julija Privedjonnaja. Laŭ ŝia advokato Mihail Trepasĉkin la tuta jura proceso kontraŭ Julija Privedjonnaja estas dubinda, ĉar pruvoj mankas pri ŝia kulpo, kaj ĉar ŝi estis arestita plurajn jarojn post la asertitaj krimoj.

La rusa polico siavice asertas, ke Julija Privedjonnaja estis arestita nur en la jaro 2008, ĉar ŝi ĝis tiam kaŝiĝis, dum ŝi mem diras, ke ŝi neniel kaŝiĝis, sed male eĉ multfoje estis intervjuita en radio kaj gazetoj.

Ŝi kontentas, ke ŝi ne devos nun reiri al malliberejo, kie ŝi jam pasigis kelkajn monatojn dum la akuzo estis pritraktata, sed ŝi intencas apelacii al pli alta instanco, ĉar ŝi ne konsideras sin kulpa, ŝi klarigis al rusaj amaskomunikiloj.

Libera Folio

8

ESPERANTISTA NEKOHERO

Antaŭ ol priskribi la nekoheron rilate al la pronomo "ci", mi montros kelkajn aliajn, kiuj jam ĝenis aŭ povus ĝeni la brazilan E-movadon.

Antaŭ trideko da jaroj granda grupo da brazilaj esperantistoj klopodis influu brazilajn deputitojn por akcepto de Esperanto en universitataj enir-ekzamenoj. Bonŝance ili malsukcesis, kaj la deputitaro adoptis neniun projekton tiucele. Des pli bone, ĉar la reago de la edukistoj estus tuja, forta kaj praviginda, ĉar la kono de Esperanto estas evidente multe malpli helpa por lernado de medicino, inĝenierarto, juro, ktp, ol tiu de la angla, franca, germana aŭ alia grava nacia lingvo. Kontraŭstari la monopolon de la angla estas laŭdinda agado, sed permesi anstataŭi ĝin nun per Esperanto ŝajnas al mi, ridindiga por la proponintoj kaj ilia movado.

En 1999 iu brazila ĵurnalisto asertis en artikolo, ke "la vic-prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo".... informis lin, ke "la E-movado kreskas" kaj ke "en Brazilo proksimume 10 mil personoj regas tiun lingvon, kaj 12 milionoj en la tuta mondo". Per la retlisto VEKI (de BEL) mi tuj protestis kontraŭ tiu misinformo intence donita de oficiala Esperanto-organizaĵo. Mi konsideras tiun informon trompa, nekredinda kaj malkuraĝa. **Trompa**, ĉar ĉiuj informitaj esperantistoj scias, ke ĝi ne estas, nek povas esti vera. **Nekredinda**, ĉar ĝi kontraŭas la plej simplan aritmetikon. Kaj **Malkuraĝa**, ĉar ĝi pli troigas la malpli ekzameneblajn informojn.

Statistikoj de la ĉefaj mondaj E-organizaĵoj supozigas, ke ĉirkaŭ 5% el la mondaj esperantistoj troviĝas disigitaj tra Brazilo. Tial, se en la mondo estus 12 milionoj da esperantistoj, en Brazilo estus 600 mil. Nepre ne malpli ol 100 mil, kaj ne 10 mil, kiel estis dirite. Ni ankaŭ scias, ke ne malpli ol triono el la brazila legipova loĝantaro troviĝas en SanRio, t.e., en facile atingebla distanco el Granda San-Paulo, el Granda-Rio aŭ el la vojo inter tiuj du megalopoloj. Triono el la brazilaj esperantistoj estus 200 mil. Nepre ne malpli ol 30 mil. La malpli ol 500 ĉeestantoj en la E-kongreso de Campinas ne kongruas eĉ kun la aserto, ke en Brazilo estas nur 10 mil homoj, kiuj "regas Esperanton". Eĉsepte se la vorto "regi" estas uzita kun granda troigo, aŭ se ekzistas gravega kialo por ke lernintoj rapide forlasu nian movadon.

Alia malvera informo de esperantistoj rilatas al Unesko, kiun mi tre bone konas, ĉar dum preskaŭ tri jaroj mi estis oficisto en ĝia ĉefsidejo en Parizo. Unesko ne apogas, nek povas apogi Esperanton, ĝian instruadon aŭ ion ajn rilatan al ĝi. Nek atakas ĝin. Neniu el ĝiaj rezolucioj apogas aŭ eĉ pritraktas la lingvon Esperanto. Ĝi nur rekonas, ke "La idealoj de la Esperantistaro estas laŭdindaj" kaj ofte koincidas kun ĝiaj. Resume, bonaj esperantistoj apogas Uneskon kaj kunlaboras kun ĝiaj projektoj (kiuj, cetere, neniam mencias Esperanton). Kaj Unesko dankas. Inversigi tiujn faktojn estas ne nur malvere, sed ankaŭ danĝere, ĉar ili riskas malplaĉi al Unesko, kies bona volo estas treege utila por nia movado.

Sylla Magalhães Chaves (02-06-1929/30-05-2009)
El prelego de 07.06.2007, KKE, Rio, Brazilo

PIEDPILKA MONDPOKALO



Futbala Mondpokalo, ĉu estis triumfo por Sudafriko? Povus esti iom troigite sugestis, kiel la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Ban Ki-moon, faris, ke Sudafriko gastiganta la turniron de Monda Futbalpokalo estis "*triumfo por homeco.*" Pli certe tio estis triumfo por Sudafriko mem, ĝenerale akklamita sekve de la dimanĉa finalo, pro tio, ke sukcese okazigis tiu lando la tutmondan sportan spektaklon malgraŭ sia perforteca pasinteco kaj siaj restantaj problemoj. Tiuj kiuj havas metodojn por mezuri ĉi tian aferon diras, ke gastigo de la Monda Pokalo grave akcelas la landan feliĉo-indekson kaj nutras komunuman senton, kiu plifortigas la nacian ŝtaton. Tial, pli feliĉa, pli bone funkcia Sudafriko estas sendube beno por homeco. La turniro estis grandioza ekspoziciejo por Sudafriko kiu ankoraŭ suferas malbonan internacian reputacion 16 jarojn post la falo de la naŭza rasapartisma reĝimo. La glateco de la organizado, la kvalito de la instalaĵoj kaj la bona etoso malpruvas la fifamon de Sudafriko kiel haosa krimlando, turmentita de rasa batalado. La turniro allogis la duan plej grandan ĉeeston en historio de la Monda Pokalo.



Proksimume duonmiliono da fremdaj fervoruloj vojaĝis al la lando, tio estas bona pruvo de sudafrika gastamo. Ne estis perforto, kaj krimoj raportitaj dum la tutmonata turniro estis bagatelecaj, multe malpli perfortaj ol iuj atendis. La nuna espero estas, ke Sudafriko sukcesos konstrui ion sur sia Mondpokala triumfo. "*Tio, kion mi lernis dum la ses jaroj da preparo por Monda Pokalo estas tio, ke se ni povas enfokusigi niajn mensojn, ni povas elradikigi malriĉecon kaj senlaborecon en ĉi tiu lando.*" Tamen, penoj per meti finon al malriĉeco en la lando kie senlaboreco atingas preskaŭ trionon de la loĝantaro estas pli malfacila kaj teda kaj malpli ŝika tasko ol prepari futbalan Mondpokalan spektaklon. Estas jam frivola diskuto pri tio, ĉu Sudafriko hodiaŭ kapablas gastigi la Olimpikojn. Tio ja estas nova defio, kiun la landon povus alfronti baldaŭ. En la nuna tempo, tamen, Sudafriko havas pli premajn kaj urĝajn defiojn en la formo de senbrida malriĉeco, malsano, krimo kaj rasa streĉiteco al kiuj estus pli bone apliki la spiriton kiun la Monda Pokalo donis al la lando... Sudafricanoj blindumitaj de Olimpikaj revoj prenu kelkajn profundajn enspirojn kaj eklaboru!

AGADO DE EBG




15-09-2010 Trevor Steele prezentis lian romanon "Flugi kun kakatuo"



15-09-2010 Trevor Steele post prelego



23-09-2010 Larue pri Astronomio



20-10-2010 Diemante prelegis



27-10-2010 Marc Demonty prelegis

ENKONDUKAN KURSON



15-09-2010 Françoise Pelegrin instruas



23-09-2010 Enkondukan kurson



13-10-2010 Enkondukan kurson



15-09-2010 Kunvenantoj en EBG

PERFEKTIGAN KURSON



15-09-2010 Familio Loisse-Cherqoui:
Laurent, Hanane, Amy, Lila,
animigas la perfektigajn kursojn



23-09-2010 Perfektigan kunvenon



13-10-2010 Perfektigan kunvenon



13-10-2010 Kunveno sen temo

11

«TUTE KOMPREENBLE: VITELLI» de Alan Griffiths

La argumento de ĉi romano ne estas tute originala (ĝin jam anticipis Jules Romains kaj plurfoje la realo mem), tamen ĝi estas ege amuza. La ĉefrolulo, Roger Diss, elpensas anekdoton. Li ĝin rakontas al kelkaj de siaj amikoj, kiuj ne kredas al li. Por kredindigi, li asertas, ke la faro okazis en la sudo de Anglujo, ĉirkaŭ 1850, kaj atribuas ĝin «al la konata violonĉelisto Vitelli». Troviĝas neniu, kiu ne rekonas tiun falsan nomon. Diss, aŭdacigita de la sukceso de sia improvizaĵo, publikigas en loka ilustrita revuo, artikoleon pri Vitelli. Kvazaŭ magie, aperas nekonatoj, kiuj memoras lin kaj indikas kelkajn malgravajn erarojn. Komenciĝas polemiko. Diss, venka, aperigas biografion de Vitelli «kun portretoj, krokizoj kaj aŭtografaj». Kinentreveno akiras la rajtojn de tiu libro kaj turnas filmon teknikoloran. La kritikistaro deklaras, ke la filmo fuŝas la faraĵojn de la vivo de Vitelli... Diss implikiĝas en novan polemikon kaj estas venkita. El kolerego, li decidas riveli la trompon. Neniu kredas al li, la homoj subkomprenigas, ke li freneziĝis. La kolektiva mito estas pli forta ol li. Iu sinjoro Clutterbuck Vitelli defendas la ofendatan memoron de sia onklo. Spiritisma centrejo en Tumbriĝe Wells ricevas mesaĝon rekte el la mortinto. Se estus de Pirandello tiu libro, Roger Diss mem finfine kredus je Vitelli.

«Ĉiu libro entenas sian kontraŭlibron», estis diranta Novalis. Tiu de ĉi libro estus kruela kaj sufiĉe pli stranga. Temus pri la historio de kelkaj komplotistoj, kiuj decidas, ke iu ne ekzistas aŭ neniam ekzistis.

Eseo de Jorge Luis Borges: Recenzoj por revuo El Hogar de Buenos Aires 1936-39
Jacob Hasbun tradukis

12

PLUTONO

Nigra, kunrigardo braĝa,
plena je petol' kaj bono,
kaj fidela kaj kuraĝa
estis ĝi, la hund' Plutono.

Forta, tre rapide saltis
ĝi, terur' de l' voj' najbara,
kaj duoble pli ĝi altis
ol mastreto sia kara.

Al la domo ne proksimis
Eĉ la ombro de latrono,
ĉar el fore li jam timis
la rigardon de Plutono.

Tage dormis ĝi konstante,
tamen, kiam nokt' alvenis,
ĉe la pordo sterniĝante,
gardan taskon ĝi reprenis.

Se kun ĝi mastro Karleto
ludruliĝis, sen admono,
ne aŭdiĝis eĉ ploreto
pro mordado de Plutono.

Dum li dormis, ĝi atentis.
Dum promen' ĝi sekvis lin.
Sian gardan devon sentis
kiel donon de l' destin'.

Sed Karleto pro malsano
devis kuŝi, kaj je l' fono,
sur matraco, ĉe l' infano
triste restis nun Plutono.

Venis multe da doktoroj,
tamen estis vana peno.
Estis domo de doloroj.
Estis domo de ĉagreno.

Kaj li mortis. El l' anguloj
venis ĝeme boja sono.
Havis larmojn en l' okuloj,
kiel vera hom', Plutono.

Ĝi lin sekvis ĝis la fino,
en silento, kun la plej
firma vol', ke la destino
lasu ĝin en la tombej'.

La fosistoj poste trovis,
apud nova tomba ŝtono,
hundon, kiu ne sin movis.
Estis morta jam Plutono.

De Olavo Bilac, tradukis Sylla Magalhães Chaves
kaj Manoel Borges dos Santos (El "Poesias
Escolhidas do Brazilia Esperanta Parnaso")



Alberto kun Regina, 4-10-2010, Coma-Ruga

MI NE POVAS IMAGI

Regina, mi ne povas imagi,
kreinte Dio, de la nenio
la kosmon, plena de harmonio,
en l' nigra haosa firmamento;
nek en la universa silento,
krei la mondpulson de l' konscio.

Ankaŭ mi ne povas imagi
krei la gamon de la koloroj
kiu estas en la kampo kun floroj;
nek en la ĉielo, la stelaron;
nek la lumaŭronon; nek la maron;
nek l' arbaron kun birdoj kantoroj.

Sed la plej supera mirindaĵo,
kiun Dio, faris de l' nenio,
estis via rigardo- pasio
aperita el l' densa nebulo,
brilante kiel glata spegulo
aŭ kiel fajra-suna radio.

...Pro tio, Dio havas formulojn,
por fari unu kreon en du,
ĉar miraklo de la Dia fluo
estis, krei viajn du okulojn.

Alberto Garcia Orive 6/2010, Bilbao, Hispanujo

FLURK

Plej verŝajne vi jam aŭdis min! Sed ĉu fakte vi konas min? Nu, mi nomiĝas Flurk. Jes, mi scias, iom stranga nomo, sed estas la estro kiu donis la nomon al mi kaj mem mi ne havas eblon ŝanĝi la nomon, mi devis akcepti, kiel mi devas akcepti ĉion.



Jakvo en Braŝovo, Rumanujo, 2-8-2010

Jes, bone, rigardu, mi estas bela! Ĉu? La felo aspektas sana kaj ĉu vi jam vidis kiel rapide mi povas kuri? Pro la gardlaboro kiun mi faras gravas ke mi aspektu bone! Kaj, jes, vigleco kaj rapideco estas deviga afero por mi! Mi venis al ĉi tiu bieno antaŭ 5 jaroj. Malgranda mi estis kaj tute ne taŭga por la tasko kiun oni antaŭvidis por mi. Estro venis kun mi al la hejmo. Li aĉetis min kaj mi povis eniri lian aŭton per kiu li veturis hejmen. Survoje, nu, mi neniam forgesas,

13

mi malsaniĝis, ĉar mi neniam estis en aŭto antaŭe. Mi vomis, vomegis, mi preskaŭ povis skribi mian nomon vomante. Jes, mi ankaŭ devis pisi kaj ne sciis ke estis malpermesata en aŭto. Mi neniam forgesis ĉar la estro tiel forte draŝis min, ke mi preskaŭ perdis konsciencon. Nu, ankaŭ estrino ne povis ridi, ĉar, iom strange, ŝi devis purigi la aŭton. Estro faris neniujn de tiuj taskoj, li nur ordonas kaj multe bruas. Li estas malĝentila viro kaj, ho dio, la maniero kiel li eksplikis al mi kiel mi devas gardi la bienon! Estis ludo por mi ekzerci voĉon kiam mi estis juna kaj mi do ofte bojis, nur pro la plezuro aŭdi propran voĉon. Estro ĉiam venis eksteren kaj kiam li ne vidis vizitanton sur vojeto al domo li aŭ batis min kaj diris ke mi devis silenti, aŭ li simple piedbatis min. Ho jes, en la komenco mi ankaŭ havis ĉenon ĉirkaŭ kolo. Tion oni faras ĉe ĉenhundo.

Rapide mi lernis kiam mi devas boji kaj kiam mi devas silenti. Kiam mi vidas homon nekonatan, mi fortege kaj kolerege devas boji. Kiam estas konatulo, mi ankaŭ bojas, sed iom pli ĝentile. Se estro ne rigardas, mi eĉ svigas la voston, sed vere kaj kredu, nur kiam mi certas ke li ne rigardas.

Kiam mi jam estis unu jaro ĉi tie, la estroj metis draton ĉirkaŭ la bieno kaj pordon kiun li povas malfermi kaj fermi el lia aŭto. Ek de tiam oni forigis de mi la ĉenon kaj mi iĝis libera hundo. Nu, libera ĝis la tago kiam vulpo venis ĉe alia

14

flanko de la drato. Estis malfrue en nokto kiam li pasis. Iom fiere sed ne tro laŭte grumblante mi iris al drato por montri ke mi ne estas ordinara ĉenhundo. "Kiel vi?" Demandis la vulpo. "Ĉu ĉio bonas en via karcerero?" Rigidege mi staris tie, senspire pro la vortojn kiujn mi aŭdis. Mi, en karcerero? Sed, diable, mi havas 3000 kvadratmetrojn nur por mi. Mi protestis kaj diris ke mi tute ne sentis min en malliberejo.

La vulpo moke ridis kaj petis ĉu mi volas kun li promenadi. Iri, ekzemple, al arbaro kiu troviĝas 10 kilometrojn for. Mi turnis al li la dorson, jes, pro honto. Mi vivas en karcerero, imagu! Jes, estrino alportas al mi ĉiutage manĝon. Nu, mi devas konfesi ke mi neniam bone scias kion fari. Ĉu ŝi estas bonhumora? Bone, mi povas karesi al ŝi la krurojn per plej dolĉa parto de mia pelto. Sed jam okazis ke mi karesas ŝin kaj preskaŭ enamiĝas al ŝi - nu, se eblas al hundo enamiĝi kun virino, jes, belege - kaj ek ŝi fortege piedbatas al mi. Diable, mi malŝategas ke oni piedbatu. Ĉiam eblas resti gentila, ĉu? Ĉiam eblas peti: "Pardonu!...Sed hodiaŭ mi ne estas karesema, ne faru!" Mi estas nekredeble fidela hundo, faras ĉion por miaj estroj, submetigas min al ĉiuj kapricoj, ĝis antaŭ semajno. Preskaŭ ĉiun vesperon pasis la vulpo. En komenco li nur mokis min sed post iom da tempo, ni iĝis amikoj kaj ni longe babilis.

Antaŭ du semajnoj li diris al mi ke mi devas veni al arbusto malantaŭ la domo. Mi kuris ĉar mi ne volis

esti malĝentila al mia nova amiko. Mi neniam volas esti malĝentila, mi naskiĝis tiel. Mi estas fidela ĝentila Flurk. La vulpo havis jam preskaŭ tute pretan tunelon kiu ebligis min iri sub la drato al libereco. Tuj mi estis ĉe alia flanko de la drato, sed jes, mi rigardis al domo de estroj kaj mi sentis malbonecon en koro. La fidela hundo kiu forlasas la estrojn, ĉu tio eblas? Mi havis larmojn en okuloj kiam mi forkuris de mia malliberejo.

Eble unu horo mi ĝuegis liberecon, tiam mi preskaŭ kuris sub aŭto kiu el nenie alvenis. Je la sesa matene mia stomako komencis protesti kaj mi diris al vulpo ke mi malsatis. Li diris: "Nu, ĉasu! Ĉar por manĝo vi nun mem devas zorgi!" Mi neniam lernis ĉasi kaj tagmeze mi preskaŭ svenis pro malsato. En rubujo mi trovis postrestojn de manĝo, sed jam tuj atakis min alia hundo, kaj eĉ kato, kredu aŭ ne!

Tiam kiam mi vere, vere malsatis mi aŭdis mian estron kiu vokis: "*Flurk, Flurk, venu knabo. Venu Flurk, nun.*" Mia koro hupegis en korpo de ĝojo kaj mi volis kuri al estro kiam mi aŭdis lin krei: "*Se vi ne tuj estos ĉi tie mi piedbato vin ĝis morte!*" Kion fari? Kia elekto? Mi estas libera nun, libera birdo kiu malsatas, kiu timas aliajn gardhundojn, kiuj ŝajne ĉiuj estas agresemaj. Mi vidis virinon, preskaŭ same bela ol estrino, kaj mi kuris al ŝi por karesi ŝiajn krurojn. Ho dio! kiel ŝi kriegis!

Viro venis el domo kun bastono kaj li severe batis min. Mi nur volis esti ĝentila! Mi estas malbonega gardhundo, mia karaktero ne taŭgas por la laboro!

Dum kvin tagoj mi profitis de mia libereco kaj tiam mi ne plu eltenis. Mi ne estas birdo, birdoj estas liberaj, ili flugas kien ili volas. Mi komprenis ke mia loko estas en bieno. Mi estas nur simpla laboristo, simpla gardhundo. Denove mi iris al tuneleto sub drato kaj reprenis mian lokon en karceron, ora prizono, mi nun komprenis. Mi metis min ne tro for de la domo kaj kiam estrino venis ekstere ŝi estis nekredible kontenta revidi min. Rapide mi kuris al ŝi kaj volis karesi la kruojn de la belulino, sed ek ŝi fortege piedbatis min kaj kolere diris ke mi havos severan punon kiam estro venos hejmen. Tiam ŝi donis al mi akvon. Rapidege mi komencis trinki por ke neniu vidu ke mi larmis. Mi pripensis: Kion fari? Severa puno ĉi vespere? Ne! Mi ne akceptos! Mi denove foriros kaj preferos morti pro malsato ol lasi min trakti kiel ordinara hundo. Je tiu momento venis estrino kun manĝo por mi. Kaj tiam mi komencis kompari. Certe severa puno ne tiel doloras ol libereco al kiu mi ne kutimas!

Mi estas gardhundo kaj mia nomo estas Flurk. Mi de tempo bojas sed, kvankam mi taŭgas al nenio, mi estas nekredible ĝentila!

Jakvo Schram, Antverpeno, Belgujo
1a de Novembro 2009

ELSTARA ESPERANTISTO JULIO MANGADA ROSENÖRN

Mangada estis hispana militisto kaj esperantisto. Naskiĝis la 30-an de junio 1877 en Sancti Spiritus, Kubo, tiam hispana kolonio; mortis en 1946 en Meksikujo. Li fariĝis esperantisto en 1906 kaj tuj komencis propagandi Esperanton per framasona gazeto. En 1911 li estis kunfondinto de la gazeto "Homaro", kiu publikigis en 1913 la politikan kaj religian deklaron de Ludoviko Lazaro Zamenhof pri "Homaranismo". En 1916 li fondis la Zamenhofan Federacion kaj ĝian organon "Hispana Esperantisto" publikigitan ĝis 1923. Li kunfondis kaj estis prezidanto dum multaj jaroj de Hispana Esperanto-Asocio.



Mangada kiam estis Kapitano

De 1928 ĝis 1930 li publikigis "Hispana Esperanto-Gazeto". De

1912 Mangada gvidis multajn kursojn. Li reprezentis la hispanan registaron dum kvin Universalaj Kongresoj. Li ludis gravan militistan kaj politikan rolon dum la Dua Hispana Respubliko kaj ĉe la komenco de la interna milito, kiam li gvidis kolonon defende al la respublikana registaro. Li estis konata kiel la *popola generalo*, kvankam vere atingis nur la rangon de kolonelo. Li devis ekziliĝi post la fino de la milito, kaj forpasis en Meksikio en 1946.

Mangada vivo:


Mangada ekmilitistiĝis en 1896, enirante la Infanterian Akademion. Framasono li ankaŭ interesiĝis pri spiritismo, teosofismo, naturismo. Li estis militisto ne ekstremisto nek fundamentalisto, sed klare progresema, eĉ radikala, kion li neniel kaŝis. Tio igas lin esceptokaza, ĉar en la 19-a jarcento, progresemaĵoj estis oftaj inter hispania militistaro, sed en la 20-a jam ne plu.

Unua evento lin vere famiginta estis, en junio 1932, la tiel nomata incidento de Karabanĉelo (tiam vilaĝo apud Madrido): en la tiea militista kampadejo, li estigis tutlandan skandalon surtretante sian militistan jakon, proteste al la rifuzo de generalo Goded konkludis paroladon per «Vivu la Respubliko».

Kelkjaroj poste, en 1936, Mangada verkis hispanlingvan libron «La faŝo en la armeo», denuncante progreson de faŝismo inter militistaro.

La «popola generalo»:

Komence de la Hispania Enlanda Milito en 1936, Mangada tuj metis sin je la dispono de la registaro, kaj ekagadis en subigo de la puĉprovo.



Omaĝe al Mangada,
dummilita tabulo en Esperanto

Li organizis unu el la unuaj kolonoj kiuj eliris el Madrido por alfronti la alvenantajn faŝistajn ribelajn trupojn el norda Afriko. La «Kolono Mangada» estis la plej fama el la tiutempaj grupoj. Ĝi estis eble la plej multnombra, kio estis interesa fakto ĉar tiutempe oni tute malfidis profesiajn militistojn, suspektante ke multaj el ili simpatias al la ribelantoj. Unu el la malmultaj je kiuj la amasoj povis fidi estis ĝuste Mangada, kiu malgraŭ sia aĝo sukcesis ekigi volontulojn al kontraŭribela batalo. La Kolono Mangada akiris du gravajn venkojn kontraŭ faŝistaj trupoj, kio ankoraŭ plifamigis Mangada-n. Poste, li estis destinita al organizaj laboroj, li okupiĝis pri trejnigo kaj organizado de trupoj en provinco de urbo Albaceto, kiu tiam gravis ĉar estis baza sidejo de

la Internaciaj Brigadoj. Militfine, Mangada ekziliĝis unue al norda Afriko. Poste, danke al kampanjo de esperantistaj organizaĵoj, li kun edzino kaj filiĉo Luis povis vojaĝi al Meksikujo, kie li trovis kelkajn siajn kamaradojn, inter ili sian samideanon, la eksdeputiton socialistan Francisco Azorín. Li tie mortis en 1946, ĝuste la 14an de aprilo, la Tagon de la Respubliko.

Mangada aktiva esperantisto:

Julio Mangada esperantiĝis en 1906 en militista rondo kaj iĝis elstara propagandisto de la internacia lingvo Esperanto. Notindas ke Esperanto-movado en antaŭmilita Hispanio abundis inter militistoj, kio, laŭ rimarko de Mangada mem, ofte mirigis alilandajn esperantistojn.

Mangada partoprenis fondon de la Esperantista Militista Asocio. Li formis intiman skipon kun du aliaj framasonoj, la militisto Fernando Redondo kaj la presisto Emilio González Linera. Ili verkis pri esperanto en la framasona revuo «Hispana Lumo» en 1907 kaj poste fondis esperantan periodaĵon «Homaro» (1912), en kiu ili defendis homaranajn ideojn kun ia influo de framasonismo. Ili sentis sin tre inklinitaj al la zamenhofa homaranismo, kaj eĉ eldonis, preskaŭ senpage, la samtitolan libron de Zamenhof. En 1917, en momento kiam ne ekzistis organizata tutlanda asocio, Mangada impulsis la fondon de la Federacio Zamenhof, kiu ekorganizis la movadon. En 1923,

li fondis ankaŭ la Hispanan Esperanto-Asocion, en kiu li okupis diversajn estrarajn postenojn, sed ĉefe redaktis la oficialan revuon, eldonadis librojn kaj broŝurojn kaj tre aktivis ankaŭ diversmaniere.



Libro de Cervantes,
tradukita de Mangada

Mangada multe klopodis por oficialaj agnoskoj; estas certe pripensinde ke li, kiu tiel aktive kontraŭis la tiamajn regantojn en politikaj bataloj, sukcesis interesi tiujn ĉi pri esperanto. Mangada ankaŭ multe instruis, ĉefe en la tre prestiĝa institucio Literatura Ateneo de Madrido. Li verkis kaj eldonis lernigan gramatikon de la lingvo por hispanlingvanoj kaj verkis originalajn poemojn kaj teatraĵojn. Li ankaŭ ektradukis,

17

18

interalie, la Kiĥoto kaj du «Bonekzemplajn novelojn» de Cervantes.

Dum la milito:

Lia esperanta agado, kompreneble, plejparte haltis dum la milito, kaj oni apenaŭ trovas spurojn de ĝi, krom intervjuon kaj kelkajn menciojn en la tiutempe eldonata «Popola Fronto». Oni trovas ankaŭ novaĵojn pri omaĝo kiun la respublikanaj esperantistoj faris al li okaze de liaj venkoj kaj per lianoma memortabulo starigota en Madrida strato; bedaŭrinde, oni ne sukcesis trovi spurojn de tiu tabulo en la postmilita Madrido. Krome, en kelkaj esperantistaj rondoj disvastiĝis novaĵo pri eperantista taĉmento kiu aktivis sub lia gvidado en la respublikana flanko, tamen tio ĉi fakte ŝajnas legendo.



Dummilita afiŝo kun respublikaj herooj,
maldekstre Mangada

Post lia ekziliĝo, li denove aktivadis, kaj ni scias pere de Eŭgeno Lanti ke li pretis labori en la reviziado de la Plena Ilustrita Vortaro. Sed la morto alvenis tro frue por ebligi tion.

Kongreslibro de SAT Amikaro




La redaktoro de
"Aktuala
Esperanto"
deziras al Vi
Bonajn Festojn
kaj
Feliĉan Novjaron
2011





Bildoj instruaj aŭ amuzaj pri vestaĵoj, vid-sonaj aparatoj, muzikiloj

SEAN O'RIAIN



Membro de EBG kaj prezidanto de Eŭropa Esperanto Unio